


2^a trimestro 2014

En tiu numero
vi legos..

Bérenĝere Turbillon kolektis informojn pri la kastelo de Bridoré	p.1 p.2 p.3
Jean-Jacques Moreau daŭrigas la rakonton pri sia vojaĝo en Irlando	p.3 p.4 p.5
Madeleine Foucher kaj Jane Pinon raportas pri la vizito de la kastelo de Bridoré	p. 5 p.6 p. 7
Jane Pinon ricevis tradukon de Bernard Behra pri Albert Schweitzer	p. 7
Bérenĝere Turbillon proponas trejnadon al rapida legado...	p. 7 kaj p. 8
kaj krucvortojn	p.8



BRIDORÉ



Superrigardante la limojn de la regiono "Berry", la situo de Bridoré [bridore] estas rimarkinda defenda loko. Ĝi jam estas notita la 7a jarcento en manuskripto sub la nomo « Brioderus vicus ». Sub la regno de Karlo la Kvina, la vilaĝo estas akirita de Johano la Unua Le Meingre de Boucicaut, kunulo de "Du Guesclin" kaj onta "Maréchal de France". Ĉirkaŭ 1400, lia edzino Florie de Lignière fondis kun Christine de Pisan la ordenon de « La Dame blanche

à l'écu » por helpi sinjorinojn kaj fraŭlinojn. Ilia filo, Johano la Dua Le Meingre de Boucicaut, kies vivo estis sufiĉe perturbita, estis "Maréchal de France" kaj avo de Diane de Poitiers. Li estas samtempulo de la poeto "Charles d'Orléans". La poeto lasis horlibron, kiu atestas pri la historio de Bridoré.

3 reĝoj mallonge restadis en Bridoré : Karlo la Sepa en 1454, Karlo la Oka en 1489 kaj Francisko la Unua en 1521. La markizo Charles de Boursault de Viantais aĉetis la kastelon en 1641. Lia plej aĝa filino Catherine Angélique fondis en 1717 en « Beaulieu-lès-Loches » aŭgustinan monaĥejon, ofte nomata "couvent des Viantaises". Tiu monaĥejo estis unu el la plej gravaj en suda Turanĝio. La kastelo de Bridoré restis unu el la personaj bienoj de la familio Boursault de Viantais ĝis la Revolucio. Tri membroj de tiu familio estas entombigitaj en la kripto de la preĝejo "Saint Roch".

Dum la Revolucio, la bieno estas vendita kiel "nacia bieno" al du

fratoj, Louis kaj Lucien Bodard kaj iĝis farmo. Ankoraŭ nun iliaj heredantoj posedas la kastelon. La kastelo estas klasifikita historia monumento en 1911, restaŭrita de la pentristoj Simone Lefèvre-Mouveau et Pierre Mouveau. Nun, Armelle Mouveau vizitigas ĝin al ni.

La kastelo, kies ĉefturopordo situas inter la du kortoj, estas konstruita laŭ originala plano laŭ la cifero 8. Ĝi estas antaŭita de vasta



birdokorto konstruita en 1475 de Ymbert de Bastarnay. Tiu favorato de Luizo la Dek Unua, konsilanto de la tri sekvaj reĝoj, vivas tie ĝis 1493. La pordego, defendita per levponto por ĉaroj kaj piedirantoj, estas

provizita de kanonaperturoj kaj ĉapelita de embrazuroj. Mallarĝa plena tureto servas kiel murapogilo. La orienta fronto de la

alta korto de la kastelo estas la plej bone konservita. La loĝejo estas verko de Johano la Dua Le Meingre de Boucicaut, mortinta en 1421. Ĝi estas antaŭita, probable dum la Religiaj Militoj, de defenda sistemo nevidebla de la kamparo, kiu permesis defendi la



fosaĵon dum atako.

Meze de la orienta loĝejo, restas sistemo de mezepoka vaporbanoj, iniciita de Ymbert de Bastarnay. La etuvo estas subtenita per la varmigĉambro



kun 4 pilieretoj el brikoj. Tiuj-ĉi varmigis la plankon sur kiun oni verŝis bolantan akvon, kiu vaporigis, dum plumbaj tuboj kondukis la akvon en la muroj.

Bérenghère Turbillon

(Sekvo de la tandema vojaĝo en Irlando)

CORK-CLONAKILTY

Al KINSALE, kaj poste ni soriras longan, longan sorvojon, krutan sorvojon, kiu laŭiras la nacian vojjon. Jen la vilaĝo FIVEMILLE BRIDGE kaj poste KINSALE, KINSALE la kolorita,



la bunta, estas tie, kie iu William PENN, kiu enuis, elektis la elmigran al Usono kaj fondis Pensilvanion. Ni antaŭeniras en fabelajn pejzaĝojn. BALLINSPIITTLE, TIMOLEAGUE trapasitaj ni eniras la urbon CLONAKILTY. Ni tendumas en farmtendumejon. La bonveno estas kamparstila, la maljuna estrino, kiu sidas malantaŭ giĉeto ne ridetas. Ni ne surpriziĝas ĉar ni sciis tion post lego de la libro « la gvidi-

lo de vojuzanto ». Ni vekiĝos ĉe la bovinoj.

De longtempe mi sentas per la piedoj ke la



pedalsistemo turniĝas kvadrade, ĉu mi eraras? Mi maltrankviliĝas.

Tiuvespere, ni aŭskultos « trad » muzikon en la kafejo « DE BARRA ».



La ornamo kiel la muziko kaj la biero bongustas.

CONAKILTY-BALTIMORE

La vojo serpentumas en belegaj agraj pejzaĝoj. La ĉielo estas luksega, la kasteloj, abatejoj, monaĥejoj, klostrejoj aperigas siajn ostarojn. La vojeto, kiu kondukas al CASTELKREKE estas bukolika, torturita vertikale kaj horizontale. La sovaĝaj golfetoj invitas al revo. Post longa momento en la pupskala haveneto UNION HALL, ni atingas la junularan gastejon en BALTIMORE, kiu ŝajnas kaduka sed pura. Ni dormos en komuna ĉambro, atentu la ronkantojn... aŭ la ronkantinojn.

Antaŭ kelkaj tagoj okazis en la vilaĝo, festivalo pri muziko « Fiddle Fair » (festo pri violono), ĉiuj rekordoj pri nombro de partoprenantoj estis atingataj. La muzikistoj faras tradmuzikajn duelojn, ili povas senĉese muziki dum multegaj horoj...

BALTIMORE estas alia irlanda Finiste-



ro, plej sude situanta, fronte al insuloj ŜERKEN kaj CAPE KLEAR, ĉie oni parolas la gaelan lingvon. La klifoj estas altaj pli ol 200 m.

BALTIMORE-BALLYLICKEY

La plej longa etapo kun kruta reliefo. SKIBERREN forlasita dum la antaŭa tago vidis nian pason pro provianto. Al MIZEN-HEAD... kun ties fama FAST-NET (velŝipa kurado). Piknikas ni sur la haveneto en SCHULL.



Ni estas en la sektoro, kie la GULF STREAM plej senteble efikas. La vegetaĵo estas fruktodona, kvankam en la gaela lingvo GLENGARIFF signifas « rokan valon ». La tre mallarĝa kaj malrekta vojo perdiĝas en la montaro ; ĉe la supro senhomas. La longharaj ŝafoj staras ĉie eĉ sur la vojoj, kiel la porkoj en Korsiko. Nun ni atingas la supron de TEAM HEALY PASS, ni estas en alia grafejo kaj eniras en la faman RING OF KERRY. Ni estas en altitudo, al ni varmas kaj ni malvarmiĝos, ni surmetas survestojn por sobiri.

BALLALYLICKEY-LAURAG

Por atingi la urbon KENMARE, ni elektas la



montaron (kial ne ?). La vojo soras forte, la sorvojo balanciĝas inter 10 kaj 17 % dum 10 km. Brumas ĉie, la vojo mallarĝiĝas, ni espe-

ras preterrenkonti nenium, ju pli ĝi soras, des pli ĝi mallarĝiĝas. Ĉio bone glatos. Komencpunkto de RING OF KERRY, KENMARE estas vilaĝo, kiu entenas 3000 loĝantojn, fama pro sia golfo, sed ankaŭ pro siaj magazenoj pri lukso... sen forgesi la trinkejojn.

Hazarde ni trovas tendumejon, la maro situas proksime. La tendumejstro parolas al ni pri « midgees », [midĝiz]. *Midĝiz* estas tre etaj muŝetoj ĉefe malsategaj, kiuj flugas en premitaj formacioj

antaŭ ol ĵeti sin sur siajn kaptaĵojn. Ili atakas ekde la somero, de Junio ĝis Septembro, Ili ne ŝatas la malvarmon, nek la venton, nek la fumon, sel ili ŝategas la eksterlandanajn tandeman-tojn. Eĉ du pantalonaj tavoloj ne sufiĉas. Ju pli ili pikas, des pli oni skrapas sin, ni travivas infernon. La *midĝiz* vivas en la torfo kaj eka-peras, kiam vento ĉesas, eĉ kulvualo ne sufiĉas. Post la *midĝiz*-a inferno, jen inferno pro sorvojoj, ni devas piediri, kompanse, la vidaĵo estas belega, ni ruliĝas sur la duoninsulon de BEARA. La domaro estas bunte kolorita sed belaspekta kiel en Alzaco.



Tiu vespere ĝardena kradrostila partio donacata de ge-



tendumejstroj. Ni kunportas kaptitajn litorinojn kuiritajn de nia bretona kuiristo kaj ni

dispartigas ilin. Litorinojn la irlandanoj neniam manĝis eĉ kiam ili suferis inter 1845 et 1850 grandegan malsategon, kiu faris 1.000.000 da mortintoj pro la terpoma foliŝimo. La irlandanoj ne pensis ke ili povis manĝi litorinojn. La maro estas riĉa je tiuj krustacoj. Ni donas la recepton al tiuj kiuj gustumis.

GAP OF DUNLOE

Hodiaŭ la programo estas turistema kaj fama. Ni forlasas la aĉajn bestetojn ne sen plezuro, por iri tra la naturo en la montoj. La urbo KILLARNEY estas invadita de motorciklantoj ĉiuj pli klanaraj ol la aliaj. Ni forkuras la bruegon por trovi la mildecon. La vojo serpentumas tra la kamparo ĉiam florata de gigantaj rododendronoj. La vilaĝa festo okazas, la biero fluas kaj la blanka ŝaŭmo kiu aperas sur la kolo de jungitaj ĉevaloj intrigas min, mi tuj komprenos, la vojo soras rapide ĝi ŝajnas ŝtuparo (kruta). Ni soriras la Gap of Dunloe. Gap signifas « breĉon », la vojo estas plen ŝtopata de gapantoj kiuj festas. La vojo estante tiel mallarĝa, ke ĝi povus faligi jungitaron en la ravinon, estas malfacile preterpasi ion aŭ iun ajn, ni estas en la fino de nenie, la naturo grandiozas, la vidaĵo ankaŭ. Ni estas devigaj peli la tandemon por ne rompi la mekanikon, kiu maltrankviligas min. Mi imagas la aferon se pluvus, ventus, stormus, sed la afabla, la varmiga suno akompanas nian karavanon. La kruta sorvojo kondukas en puregan junularan gastejon perditan en la montaro, ni estas en la Black Valley, kun rokoj, kiuj ŝajnas falintaj el la ĉielo, ili estos la unuaj kiuj vidis kvin francajn tandemantojn.

AL LADIES VIEW



Ni soriras laŭirante riveron, ni pasas sur ŝtonan ponton, kiu permesas al ni atingi Ladies View, vidpunktejon sur tri lagojn, kiuj interkomunikas. Ni admiras la mirindan Upper Lake-n, la Middle Lake-n kaj la Lower Lake-n kiuj estas parto de la Nacia Parko de Killarney. Oni sentas, ke tiuj pejzaĝoj estis fasonitaj de glaĉeroj, la etoso estas eksterordinara. Ni retroiras por gliti trankvile al la maro. Ni renkontas butikon de biciklriparisto, sed la estro estas mallaborema, ne necesas insisti. Ni piknikas en Sneem. Charles de Gaulle venis tien por ripozi post la eventoj en Majo 1968. La irlandanoj omaĝis al li starigante monumenton, sur kiu estas gravurita tiel : « En tiu grava momento en mia longa vivo, mi trovis ĉi-tie tion kion mi serĉis : esti fronte de mi mem. Irlando ofertis ĝin, per la maniero la

VIZITO DE LA KASTELO DE BRIDORE



Dimanĉon, la 6an de Aprilo, 13 esperantistoj

de Tours kaj 2, alvenante el Angers, retroviĝis ĉe la piedo kastelo de Bridoré, ĉirkaŭ la deka.



Post "bonan tagon" al ĉiuj, ni renkontis na Armelle Mouveau, bienulino de la kastelo. Ŝi estis nia ĉiĉeronino por viziti sian bienon.

Tiu dikega kastelo aspektas mezepokan fortreson. Altega ĉefturo kaj tri aliaj turoj superstaras la kastelon kiu estas ĉirkaŭita seka fosaĵo.

Nun, la vizito komenciĝas, en la ĉefturon.

La postenigitaj gardistoj en la teretaĝo protektis la loĝantojn.

En la unua etaĝo, estas ĉambro uzita kiel salono kaj ĉambreto kie servistoj laboris.

Kiam ni supreniris je la dua etaĝo, estas salono, kie feŭda sinjoro ricevis la aliajn famajn personojn ; flanke, alia ĉambreto utiligita kiel servistarejo.

La tria etaĝo estas loĝejo por la tuta familio. De tie, la vido sur la kamparo estas mirinda.

Kiam ni malsupreniris el la ĉefturo, ni eliris la unuan korton (alta korto), rezervitan al la feŭda sinjoro. En tiu korto, estas la puto, tre grava, por provizi la akvajn bezonojn de la multaj loĝantoj.

Poste, ni trapasis la ĉefturon, por eniri la duan korton (birdokorton) rezervitan al la

servistaro. Ni atingis tureton. Ĝi, estis la rezervejo, kien oni engrenejigis la manĝaĵojn. Se la fortreso estus atakita, la loĝantoj transvivus dank' al tiuj proviantoj.



Ni daŭrigis viziton ekstere kaj ni vidis postsignojn de du etaĝaj rondirejoj kaj unu « caponière » lokita en ĉirkaŭ-

fosajo. Tiu kastelo enhavis 4 « caponières » lokitajn en la kvar anguloj. La tre bona konservo de tiuj raraj konstruaĵoj permesis ĝian klasifikon kiel historiaj monumentoj en 1911.

Poste, ni atingis la internon de unu « caponière ». Granda triangula dorsapogita ĉambro, kies dikegaj muroj estas traboritaj de kanonaperturoj sur 2 flankoj. Ĉiu flanko havas tri vicojn da kanonaperturoj, de kie, la soldatoj pafis al malamikoj.



Kiam ni eliris de la « caponière », ĉiam interne de la kastelo, ni malkovris vaporbanejojn. Estas speco de tre profunda forno konstruita el brikoj. Ymbert de Bastarnay, revenante el Turkio, alportis modelon kaj konstruigis tiun sistemon, tre maloftan tiu epoke (fino de la 15 an jarcento).





Ni forlasis la kastelon kaj vizitis la preĝejon St Roch. Ni vidis diversajn pentraĵojn sur la muroj kaj, ĉefe, la skulptaĵon reprezentantan la legendon de St Hubert..

Ni aŭtis al la restoracio en Loches, kie la gastejestro estis akceptema, la menuo bona kaj la etoso tre agrabla.

Kiam ni eliris de la restoracio, kelkaj vizitis muzeon



kun aprecindaj pentraĵoj de Le Caravage. Unu el ili estas « Le repas d'Emmaüs ».

Tiel finiĝis tiu simpatia tago.

Madeleine Foucher kaj Jane Pinon

POR RESTI JUNA



La juneco ne estas periodo de vivo, ĝi estas menso-stato, ĝi estas impulso de volo, viglo de kreema imago, forto de sentoj, venko de kuraĝo super la malbraveco triumfo de aventura spirito kontraŭ la pigreco.

Neniu maljuniĝas pro la amasiĝo de vivojaroj : oni maljuniĝas nur kiam oni forlasis siajn idealojn.

La haŭto faltas laŭ la fluo de jaroj, sed la fakto rezigni je entuziasmo donas faltojn al la animo.

La ĉagrenoj, la dubo, la manko de memfido, la timo kaj la perdo de ĉiu espero estas kvazaŭ longaj, tre longaj jaroj, kiuj kuntrenas la kapon al la tero kaj kurbigas la menson en sia rekteco

al la polvo.

Eĉ se oni aĝas sepdek aŭ nur dek-sep jarojn, en ĉiu el ni funde de la koro vivas la nostalgio de plezurego, la admiro kiu grandigas nin fronte al la eternaj steloj, la eternaj aferoj kaj pensoj, la aŭdaco libera el ĉiu timo, la serena ĝojo, la apetito vivi kaj la infana nesatigebla atendo pri tio, kion la morgaŭo alportos al ni.

Vi estas tiom juna kiom via memfido kaj tiom maljuna kiom viaj duboj, tiom juna kiom via fido kaj tiom maljuna kiom viaj timoj, tiom juna kiom viaj esperoj kaj tiom maljuna kiom viaj senkuraĝigoj.

Vi restos juna tiom longe kiom atingos vian koron la mesaĝoj de beleco, de ĝojo, de aŭdaco, de grandeco, de homa estulo kaj de senfineco.

Kiam vi malsupren lasos pendi viajn flugilojn, kiam kio plej profunde vivas en via koro estos kovrita de neĝo de pesimismo kaj de glacio de cinikismo, nur tiam vi vere estos fariĝinta maljuna.

Albert Schweitzer

*Jane Pinon ricevis tiun tekston
tradukitan de Bernard Behra*

TREJNADO AL RAPIDA LEGADO

Jen du tekstoj, unu en la franca, la alia en esperanto. La vortordo estas normala sed la literoj de la vortoj estas miksitaj, krom la unua kaj la lasta. Kiel ekzemplo : Cmome = Comme

Franca teksto : Fnraca ttkeso

Nuos cmomncos la vitsie par la puls irtnésenate des aiencnens reus mcarhadnes. Puor avior une iéde de la reihscse et de la psiusnace, il fuat alelr vior l'élgsie cnrtostuie à mi-pcoarurs de la reu au peid de la cnlilo. Elle se prétense cmome un lnog pliaas calsqsiue de duex égates à dix fneêrets.

Epasernta ttkeso :

Kai blea metano de jiulo !

Tre dloĉa atreoo, ridaa snuo, moedlia knato de asamo da ĉepacisoj boridj, puframo de di-servaj foorlj sed pferere dleĉoga puframo de mutlolokraj rzooj en la mollanga aelo.

Bérgenère Tibroluln

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
A										■
B								■		
C					■					
Ĉ							■	■		
D										
E	■		■		■	■				
F										■
G	■			■						■
Ĝ										
H			■				■			■
Ĥ							■			

HORIZONTALALE


- A - Ne tuŝebla baz' de Esperanto
- B - Forto - Sufikso
- C - Totala - Moviĝi por atingi ion
- Ĉ - Sportaj grupoj - en "diri"
- D - Tia estas la lingvo de L.L.Z.
- E - El tiu materi' estis la naskiĝdomo de L.L.Z.
- F - Lingvo internacia
- G - Demanda vortero - Komenco de energio
- Ĝ - Naskiĝurbo de L.L.Z.
- H - Sufikso - Rando de ŝtofo malĝuste kudrita - Muzika signo (fonetike)

VERTIKALE

- 1 - Por L.L.Z., la kutimo estas fari tion la 15an de Decembro.
- 2 - L.L.Z. esti tia filo de Marko kaj Rozalia Zamenhof.
- 3 - De malsupre supren, konjunkcio. - Preĝema.

- 4 - Tiel forpasis multaj familianoj de L.L.Z. - La kreinto de Esperanto.
- 5 - Far' - Valora metal' - Reveno
- 6 - Al mi - Por teni la tason
- 7 - Di' de la ventoj - Malgranda aln'
- 8 - Acida frukto.
- 9 - Malo de rektiĝo - Por la sekvo.
- 10 - Tian guston havas nur la piro. - 24a litero de la esperanta alfabeto.

Bérenĝère Turbillon



Centre Culturel Esperanto Touraine
 Halles de Tours
 Place G. Paillhou
 37000 TOURS
 Tel : 02 47 44 62 12
 esperanto-touraine37@wanadoo.fr